



La Riverego

Printempo de 1994

Esperanto-Societo Kebekia

Nº 34º, Jaro 9º

Kiam Sade propagandas virton

Márta Dikman

Un Sade vertueux: c'est ce que nous offre la première traduction en espéranto du Divin marquis. Tiré de la série des Crimes de l'amour, cette histoire souligne la cruauté de la fatalité et l'importance... de la vertu, mais non sans ironie.

Infero sur biblio-papero — pertiu slogan reklamis sian novan, kompletan Sade-serion la franca eldonejo Gallimard. Nu, ekvidante la helflavan kovrilon de la unua Esperantilingva Sade-novelo oni ne antaŭflaru la sulfuron: la historio de *Florville kaj Courval* estas malpli infereca ol la plimulto de la Grimm-rakontoj. Tiuj kiuj konas la dian markizon simple per onidiroj; tiuj, kiuj legis nur liajn plej famajn verkojn — *Filozofio en buduaro*, *La 120 tagoj en Sodomo*, *Justine*, ktp. —, eble surpriziĝos pro la relativa senskandaleco de tiu ĉi novelo: nek aŭdacega libertina filozofiado, nek fantazio-provaj priskriboj de divers tipaj diboĉadoj... Anstataŭe: melodramecaj scenoj, piaj diskursetoj, eleganta retoriko kaj rafinite komplikigita, milde horora incest-historio; kastrita, rozoakva, rokokostila versio de la Edipa legendo. Malsame al la greka mito, la senkulpa kulpulo, kiu sensciante mortigas unu el siaj gepatroj kaj edziĝas kun la alia, estas ĉe Sade ne heroa viro, sed gracia, dolĉa-karaktera, diotima fraŭlino. Se ŝi estas pli naiva, pli purkora, pli senpeka (kaj multe pli seninteresa!) kreitajo, ol

la Teba reĝo, la listo de siaj montraj krimoj pli longas: laŭ la inventaro en la antaŭparolo, ŝi kulpas je du murdoj kaj tri incestoj(!). Sade streĉis ĝis la plej ekstremoj la kontraston inter la milda karaktero kaj la de-hazardo-diktitaj fiagoj de sia heroino, por ilustri la neeviteblecon kaj kruelegecon de fataleco — kio estas unu el la plej insiste ekspluatataj temoj de la mond-literaturo.

Nu, tiu ĉi novelo de Sade certe ne apartenas inter la plej altkvalitaj artaĵoj de «la forto de l' destino»-literaturo. La roluloj estas unudimensiaj paperfiguroj, la agado enhavas plurajn mallertaĵojn, Sade ne sukcesas konvinkige prezenti la monstrecon de la duoble murdista heroino (kies unua terura hommortigo estas nur akcidento okazinta dum laŭrajta sindifendo, kaj la dua konzistas simple el kulpiga atesto kontraŭ iu pekulo)... Tamen, malgraŭ ĉiuj siaj mallertaĵoj, *Florville kaj Courval* estas ĉarma legaĵo. Eble pro ankoraŭa manko de kuraĝo, Sade montriĝas ĉi tie malpli didaktika ol en siaj grandaj verkoj. Kontraŭe al la tre unusenca ideologio de la ĉefverkoj, *Florville* karakteriziĝas de iu subtila

dubscienceco: delikata ironio montradas sin malantaŭ la piega tono. Cetere, kvankam la historio de ĉi tiu rakonto estas plene tragedia, ĝi radias sunbrilan optimismon.

Ĉiuj roluloj ĝiaj (bonaj katolikoj samkiel proprincipaj libertinuloj) estas simpatiaj, noblecaj, bonkoraj; ne ekzistas eĉ unu nocvolulo, eĉ unu «sadisto» inter ili.

La traduko de Armela LeQuint kaj Jak Le Puil estas vere plezuriga. Krom kelkaj senmotivecoj (ekzemple la inversita vortordo de la 31-a paĝo: «la de Sino de Verquin persevereco»), ĝi bone sentigas la dekokajrcentan aromon de la Sade-a teksto. La enkonduko estas malpli sukcesinta. Ni ne tro fidu la vivrakonton de Sade; ĝi insistas repetas la tradiciajn erarojn de malnovaj Sade-biografioj. Ekzemple, hodiaŭ oni jam scias, ke ne la bopatrino de Sade respondecas pri lia enkarcerigo, sed lia propra patro, tamen la enkonduko priskribas ŝin, kiel «timinda[n] kontraŭstarantino[n]». Ne nur la faktaj fuŝaĵoj de la enkonduko, sed ĝia generala vidmaniero estas kritikinda: prezenti Sade-on kiel «propeka[n] bovo[n]», kiu kvazaŭ senkulpe suferis

...Kiam Sade...

dumvivajn kruelajn persekutojn, atestas pri profunda miskompremo aŭ malkono de historiaj cirkonstancoj. Ni ne forgesu: Sade, profeto de grupa fikado, ambaŭseksemo, ateismo, vivis dum epoko kiam sodomio estis mortpunata!

Sade: *Florville kaj Courval aŭ fataleco* (el *La krimoj de l'amo*)

Elfrancigis Armela LeQuint kaj Jak Le Puil.

Eldono de Gilbert R. Ledon, 1992, 79 paĝoj.

Lu dans la presse

À la mi-février, un article à la une du cahier consommation de *La Presse* a de nouveau attiré l'attention sur l'espéranto et sur le président de la Société québécoise d'espéranto, Normand Fleury. Bien que, dans un souci «d'objectivité», le journaliste ait aussi donné la parole à des «spécialistes» se prononçant «contre» l'espéranto, et bien qu'on ne mentionnât pas notre adresse, cet article a donné lieu à plus d'une dizaine de demandes d'information, dont plusieurs se sont soldées par des nouvelles adhésions à la S.Q.E.

Generala kunveno Assemblée générale

La estraro de la Esperanto-Societo Kebekia oficiale invitas ĉiujn membrojn de la Societo ĉeesti la jaran ĝeneralan kunvenon, kiu okazos dimanĉon 12^{an} de junio de 1994, ekde la 10^a horo, ĉe la feriejo *Aux Berges Dominique-Savio*, 545, chemin du Lac, en Sainte-Catherine-de-Hatley, okaze de la printempsa renkontiĝo de E.S.K.

Tagordo

1. Malfermo: elekti de kunvenestro kaj de protokolanto; akcepto de la tagordo
2. Akcepto de la protokolo de la kunveno de la 13^a de junio de 1993.
3. Raporto de la estraranoj kaj demandoj.
4. Diskuto pri venonta agado.
5. Fermo.

Por la estraro, la sekretario-kasisto,

Sylvain Auclair

Soirée de poésie

Une soirée de poésie croate, lue en croate, en espéranto et dans six autres langues, et agrémentée de musique, aura lieu le 20 avril prochain, de 19 h à 21 h, à la bibliothèque du Mile-End, située au 5434, avenue du Parc, à Montréal. Organisé par la *Société québécoise d'espéranto*, avec l'appui de divers autres organismes, cet évènement sera une bonne occasion de montrer comment l'espéranto peut servir de pont entre les cultures. Venez en grand nombre.

La Riverego (*Le fleuve*) est publié par la Société québécoise d'espéranto en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 150 exemplaires sur papier recyclé. Gratuit pour les membres de la S.Q.E. Autrement, l'abonnement annuel est de 10 \$.

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia, en marto, junio, septembro kaj decembro. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 150oble sur reuzpapero. Senpage por la membroj de E.S.K. Por aliaj, la jara abono kostas 10 CAD. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

Échéance pour le prochain numéro / Limdato por la venonta numero: 1994.06.01.

Rédacteur: redaktis Sylvain Auclair. Ont collaboré à ce numéro / Kunlaboris al ĉi tiu numero: Suzanne Bolduc, Márta Díkman, Normand Fleury, Louise Labelle kaj Sylvain Quirion. Administrateurs de la S.Q.E. / estraranoj de E.S.K.: Normand Fleury (président / prezidanto), Jean-Claude Bélanger (vice-président / vicprezidanto), Sylvain Auclair (secrétaire-trésorier / sekretario-kasisto), Jacques Dufour kaj Sylvain Quirion.

Esperanto-Societo Kebekia / Société québécoise d'espéranto

6358-A, rue de Bordeaux
Montréal Québec H2G 2R8
Répondeur / telefonrespondilo: (514) 272-0151

Forpasis Sino Rose-Emma Cléroux

Louise Labelle

Madame Cléroux fut un pilier de l'espéranto à Montréal durant plus de 15 ans. Elle s'est dépensée sans compter pour le mouvement; elle fut présidente du Club d'espéranto de Montréal; elle a organisé quelques congrès, a été guide de cours pour débutants et a recruté nombre de nouveaux espérantistes. Nous gardons un très bon souvenir de cette souriante amie et espérantiste.

Antau 24 jaroj, okaze de informvespero pri Esperanto, mi havis la plezuron konatiĝi kun Sino Rose-Emma Cléroux. Neniam mi forgesos tiun fervoran personon, kiu ne hezitis surkapigi perukon, ĝian malantaŭan parton antaŭe, ĉar laŭ ŝi, ĝi tiel aspektis pli bela.

Rose-Emma esperantistiĝis je la komenco de la 60-a jaroj. Dum la internacia ekspozicio en 1967, ŝi partoprenis vesperajn renkontiĝojn en la skolta konstruejo kaj, de tiam, aktivis por la Esperanto-movado.

Ne ofendiĝema persono, ŝi senpene trovis manieron por valorigi la membrojn. Dum kongresoj en Frederiktono, Montrealo, Otavo kaj Toronto, ŝi privilegiis la homajn renkontiĝojn, la socialajn vesperojn kaj la ekskursojn.

Senegala varbistino, ŝi ĉiam varme parolis por la movado kaj ties celoj. Tre aktiva membro de la Montreala Esperanto-Klubo, ŝi estis ties prezidentino dum multaj jaroj. Ni ĉiam trovis ŝin preta kunordigi kongresojn, starigi kaj gvidi kursojn aŭ organizi festojn okaze de Zamenhof kaj de la

Semajno de Internacia Amikeco. La pordo de ŝia hejmo malfermiĝis tage kaj nokte por la esperantistoj.

En 1984, okaze de la montreala antaŭkongreso al la Universala Kongreso en Vanкуvero, MEK kaj ESK honoris ŝin pro ŝia ĝenerala aktiveco en la sino de la movado; tio estis ŝia lasta pubika apero por Esperanto.

Multaj gēesperantistoj kaj mi mem konservos agrablajn memorajojn de tiu sindona, aktiva kaj ĉiam ridanta amikino.

Des cours d'été d'espéranto auront lieu à l'université de Hartford (Connecticut), du 11 au 16 juillet, ainsi qu'à l'université d'état de San Francisco, du 27 juin au 15 juillet. Plus de détails auprès de la Société québécoise d'espéranto.

Finfine alvenis la *Listo de gastigantoj de la Pasporta Servo de... 1993*. Ĝi estas aĉetebla de la *Esperanto-Libroservo en Montréal* kontraŭ 18 \$. Ni ofertas ĝin, se temas pri la nura ero de mendo, por 20 \$, kune kun la sendokostoj (ĉekon skribu al nome de *Esperanto-Libroservo*). Rapido: estas nur naŭ ekzempleroj.

Comme chaque année, la jeunesse espérantiste hongroise invite les espérantistes du monde à sa Semaine espéranto jeunesse, qui cette année aura lieu dans la cité médiévale de Kőszeg, près de Szombathely, du 15 au 21 juillet 1994. Les prix (tout compris) sont de 215 ou 255 marks allemands, selon le logement.

Sajnas ke la priverkita renaskiĝo de KEJO estis nur pajlofajro. Jam en decembro ĉesis okazi la monataj renkontiĝoj, interalie pro nova okupiteco de Reĝo. Kaj plu amasiĝas la atendanta literaro al KEJO.

Comme à chaque année, le Centre culturel espérantiste de La Chaux-de-Fonds, en Suisse romande, offre un programme d'activités variées. Contactez-nous pour obtenir de plus amples renseignements.

Mortis Sro Henri F. Ellenberger en majo ĉi-jare, post longa malsano. Naskita en 1905 en Sud-Afriko, li studis psikologion kaj en 1959 alvenis en Montrealon, kie li instruis ĉe McGill- kaj Montreala Universitatoj. Li verkis *À la découverte de l'inconscient*, milpaĝan libron, kaj fakiĝis pri la historio de psikologio. Delonge esperantisto, li tamen neniam tre aktivis en la loka movado. Ekzistas en Parizo centro de esplorado pri psikologio nomita je li. Laŭ informoj de sia filino, Sino Irène Ellenberger, kiu donacis libron al la Montreala Esperanta Kluba Biblioteko. (Normand Fleury)

L'espéranto, une langue littéraire

Lors de la réunion tenue en septembre dernier, à Saint-Jacques-de-Compostelle, en Galicie (Espagne), l'association internationale d'écrivains PEN (pour poètes, essayistes, nouvellistes/romanciers) a accepté dans ses rangs le Centre PEN espérantiste, dont sont entre autres membres Perla Martinelle, Giorgio Silfer et István Nemere. L'espéranto a donc été officiellement reconnu comme langue littéraire.

Les fondateurs du PEN espérantiste s'inspiraient nommément du *Manifeste de Rauma*, adopté en 1980 par de jeunes espérantistes. Selon ce

document, les espérantistes constituent une «diaspora linguistique», à laquelle ses membres adhèrent en pleine conscience. Par conséquent, il ne s'agit pas de propager l'espéranto comme une langue seconde internationale, pour le présent ou l'avenir, mais comme la langue principale d'une communauté transnationale.

C'est à ce titre que la littérature espéranto peut être considérée sur le même pied que les littératures nationales. En effet, bien que le PEN-Club international, dont le but principal est le soutien à la création littéraire et la défense de la liberté d'expression (dans

les années 30, les écrivains nazis en avaient été exclus), ait d'abord été constitué d'associations nationales, il a, dès 1922, c'est-à-dire l'année suivant sa fondation, rompu cette barrière en acceptant une section catalane. Au Canada, l'association compte deux centres.

Certains membres du PEN considèrent la section espéranto comme les sections d'autres diasporas: les sections yiddish, arménienne, kurde, tzigane. Un journaliste galicien a même comparé les espérantistes aux Bosniaques, deux «peuples» qui cherchent leur voix.

De nouveau à Ottawa

Sylvain Auclair

Pour la deuxième année consécutive, le groupe espérantiste d'Ottawa a invité cet hiver les espérantistes québécois à participer à une fin de semaine, en février. Dix Montréalais ont répondu à l'appel et se sont donc joints à une douzaine d'Ottaviens dans un programme semblable à celui qui nous avait été proposé l'année dernière, et qui avait satisfait tous les participants.

Comme de coutume, la soirée de vendredi a été consacrée à l'*interkona vespero*, avec des activités proposées par Normand Fleury, dont l'inventivité semble sans limite. Par la suite, les visiteurs montréalais se sont divisés entre leurs hôtes locaux pour la nuit — certains en ont profité pour prolonger la soirée.

Pro la forvojaĝo de S. A. Farani, la estraro de E.S.K. alektis Sron Jacques Dufour kiel anstataŭanton. Le départ de S. A. Farani a amené le C. A. à élire M. Jacques Dufour comme remplaçant.

Le samedi matin (à dix heures, ce qui semblait quand même tôt aux «prolongateurs» de la veille), nous nous sommes de nouveau réunis au centre communautaire qui hébergeait en partie la rencontre, pour discuter sérieusement du travail bénévole: sa nature, ses buts, qui s'y adonne. Après un dîner dans un restaurant mexicain, l'après-midi a été libre: plusieurs en ont profité pour parcourir le canal Rideau en patins; les autres, pour se préparer aux activités de la soirée.

Comme l'année dernière, cette soirée a eu lieu à Hull, chez Richard Piper. Il s'est agi d'un repas communautaire, dont les Québécois étaient les invités. Quand tout le monde eut fini de manger, ont débuté les activités culturelles. Mark Fettes nous a lu la (fausse) légende de *Knaħoħsveūpsceg*; a suivi la lecture d'un poème de Zamenhof et d'une parodie de ce poème (*La vojo* et *La misvojo*) par Mark Fettes et Yves Bellefeuille; après que Barclay Johnson nous eut raconté

comment il a failli déclencher une révolution en Thaïlande, Ma;rla et moi avons présenté une version raccourcie (et approximative) de *La leçon*, d'Eugène Ionesco. La soirée se termina en chansons et musique.

La matinée du dimanche a été consacrée à la visite d'un musée. Cette année, on avait choisi le Musée de la Nature, et plus particulièrement les expositions sur la géologie et sur le papillon monarque. Avant la visite, Beverly Olds avait enseigné le vocabulaire approprié, au sujet duquel un concours a ensuite eu lieu, avec des prix (des géodes, entre autres) aimablement offerts par Suzanne Caron-Richer. Après un dîner communautaire (au centre communautaire) le tout s'est terminé par une séance de discussion critique sur l'évènement, au cours de laquelle on a entre autre traité de l'opportunité de déplacer la rencontre vers le printemps (pour le Festival des tulipes, par exemple).

Legu, legu !

La printempsa renkontiĝo 1994

Sylvain Quirion

Kiuj: Ĉiuj estas bonvenaj. Alkonduku viajn geamikojn, familiarojn, najbarojn, k.t.p. Venu kaj venigu multnombro.

Kie: Pro la ĝeneralaj petoj, la renkontiĝo okazos denove en Sainte-Catherine-de-Hatley, kiel la pasintajn jarojn.

Kiam: de vendredo 10^a (vespero) ĝis dimanĉo 12^a (posttagmeze) de junio 1994.

Kio: Programo: Krom la ĝeneralaj kunsono de E.S.K., okazonta dimanĉan matenon je la deka, oni pretigis nenion alian. Ni do kuraĝigas vin ĉiujn priplensi programeron. Ni atendas viajn proponojn. Sciigu min antaŭe, se eblas, por ke ni povu pretigi programon. Se via projekto postulas pretigadon de la partoprenantoj, voku min eĉ pli frue, por ebligi min sciigi al ĉiuj. Tiuj, kiuj neniam venis en tiun lokon, sciu ke troviĝas lago, naĝbaseno, granda tereno kun loko por ludi retplikon kaj loko por fari bivakfajron. Ni disponos multajn barkojn: kanuojn, remil- kaj pedal-boatojn.

Manĝoj: La manĝoj estos pretigitaj de kvar volontuloj, trovotaj, po unu por la tri ĉefaj manĝoj (sabata kaj dimanĉa tagmanĝoj, kaj sabata vespermanĝo), kaj unu por la du matenmanĝoj. La kvar ĉefkuiristoj senkoste ricevos ĉiujn siajn manĝojn dum la semajnfino. Se vi deziras esti unu el la kvar ĉefkuiristoj, voku min (Silko: (514) 278-4797), diru kion vi intencas kuiri kaj kion vi bezonas aĉeti. Vi ricevos helpon por prepari vian manĝon, sed vi respondecos pri la aĉetado de la ingrediencoj. Ni pagos la fakturojn

kaj dividos la koston inter la aliaj mangontoj.

Kostoj: Lito en ĉambro: 25 \$ por la tutu semajnfino. (Nepre kunportu littukojn aŭ dormsakon.)

Tendumanto: 15 \$ por la tutu semajnfino.

ESKanoj kaj eksterkebekianoj ĝuos 5-dolaran rabaton.

Infanoj 12-jaraj kaj pli junaj ne pagos.

Oyez, oyez !

La rencontre printanière de 1994

Sylvain Quirion

Qui: tout le monde est bienvenu. Amenez vos ami-e-s, vos parents, vos voisins-e-s. Venez en grand nombre.

Où: à la demande générale, la rencontre aura de nouveau lieu à Sainte-Catherine-de-Hatley, comme par les années passées.

Quand: du vendredi 10 juin (après souper) au dimanche 12 juin (en après-midi) 1994.

Quoi: Programme: en plus de l'assemblée générale de la S.Q.E., qui aura lieu le dimanche matin dès dix heures, rien n'a été prévu. Nous vous encourageons donc tous à réfléchir à une activité. Faites-le-moi savoir d'avance, si possible, de manière à pouvoir établir un programme. Si votre projet exige une préparation des participants, contactez-moi encore plus tôt, pour que je puisse le faire savoir à tous. Ceux et celles qui ne sont jamais allés là-bas apprendront avec intérêt qu'on y trouve un lac, une piscine, un grand terrain où il est possible de camper, de jouer au volleyball ou de faire un feu de camp.

Plusieurs embarcations seront à notre disposition: canots, chaloupes et pédalos.

Repas: Les repas seront préparés par quatre volontaires — à trouver —, un pour chaque repas principal (les dîners du samedi et du dimanche et le souper du samedi) et un pour les deux déjeuners. Ces quatre personnes recevront gratuitement tous leurs repas. Pour en être, contactez-moi (Sylvain Quirion: (514) 278-4797), en me disant ce que vous désirez préparer et ce que vous avez besoin d'acheter. Vous recevrez de l'aide pour la cuisine, mais vous serez responsables des achats. Nous rembourserons les factures et partagerons les coûts entre les autres participants.

Coûts: coucher en chalet: 25 \$ pour la fin de semaine (apportez votre literie ou votre sac de couchage).

Campeur: 15 \$ pour la fin de semaine. Les membres de la S.Q.E. et les non-Québécois jouissent d'un rabais de 5 \$. Gratuit pour les enfants de moins de 13 ans.

Faux amis

Bien qu'ils soient tous deux des oiseaux, il ne faut pas mélanger le **papago**, *perroquet*, avec le **pavo**, le **paon**. À ma connaissance, aucun des deux ne se nourrit de **pavavo**, de *pavot*, ni ne vivent sur le **pavimo**, le *revêtement d'une rue*, qu'il soit fait de **pavimeroj**, de *pavés*, ou d'autre chose.

À moins que vous ne bégayiez, vous ne risquez cependant pas de confondre le **papago** avec le **pago**, le *paiement*. Avec un chapeau, ce paiement devient une *page*, une **paĝo**.

Si vous êtes à la *Cour du Roi*, la **kortego**, sans doute rencontrerez-vous un *page*, **paĝio**. Ce qui serait moins probable à la *Cour de justice*, la **kortumo**, ou dans votre propre *cour*, votre **korto**. À propos, y parlez-vous souvent espéranto?

La guerre de l'aspect et du temps

On a sans doute aujourd'hui peine à l'imaginer, mais, il y a quelque trois ou quatre décennies, une véritable guerre a déchiré le mouvement espérantiste, et jusqu'à l'Académie de l'espéranto. Les protagonistes: *itistes* contre *atistes*, ou, si l'on préfère, les aspectuels contre les temporels... Suite à un vote, les *itistes* auraient gagné.

Cet article n'a pas pour but de relater toutes les péripéties de cette «guerre», ni même de présenter les notions de la grammaire des verbes que sont l'aspect et le temps. Plus modestement, j'aimerais vous entretenir des circonstances de l'utilisation des diverses formes du participe.

Rappelons tout d'abord que l'espéranto compte six suffixes du participe. Trois sont passifs: *it-*, *at-* et

ot-. Et trois sont actifs: *int-* et *ont-*. Ces deux séries présentent, dans l'ordre, les participes passés (qui, en français, sont cependant toujours passifs), présents (en français, toujours actifs), et futurs. Dans tous les cas, on peut compléter les suffixes par *-a*, pour former l'adjectif, ou par *-o*; dans ce dernier cas, le participe désigne alors la **personne** qui accomplit (dans le cas des participes actifs) ou qui subit (dans le cas des participes passifs) l'action.

L'usage des participes futurs ne présente pas de difficulté — peut-être parce que peu de langues naturelles en possèdent, ce qui limite les possibilités de confusion. On les utilise quand l'action est postérieure au moment de référence, moment qui est souvent marqué par le verbe utilisé avec le participe.

Ce sont les deux autres qui créent des problèmes. Si l'on considère le français, on remarque que le passif est toujours passé, et que l'actif est toujours présent — il nous est donc parfois difficile d'utiliser correctement toutes les ressources de l'espéranto. Les participes passés — actif ou passif — font référence à une action qui est **complètement terminée**, ou dont on veut montrer l'**antériorité**. Si l'on parle d'une *vendita domo*, il s'agit d'une maison dont la vente est finalisée. Si l'on parle d'un *aminta knabo*, il s'agit d'un garçon qui aimait, mais qui n'aime plus.

Les participes présents, quant à eux, font référence à une action qui **dure**

pour *autre*, *altr-*, par exemple, personne n'aurait vu la nécessité de l'ajouter aux corrélatifs, tout comme personne ne voit l'intérêt d'une série créée sur *sam-*.

L'espéranto offre des ressources variées, qu'il faut cependant apprendre à utiliser avant de modifier l'équilibre de la langue, avec des effets secondaires parfois importants.

Autrement dit

Tous ceux et toutes celles qui se sont mis à l'étude de l'espéranto ont buté sur le tableau des corrélatifs: **iu**, **tiu**, **tio**, **nenial**, **cie**, etc. Ceux et celles qui ont réussi à les mémoriser (je sais, je sais, c'est un peu mélangeant au début) finissent par tellement les aimer qu'ils veulent agrandir le tableau.

La série la plus souvent ajoutée est la suivante: **alie**, **aliel**, **alial**, **alias**, etc. Ces mots proviennent tout naturellement de la racine du mot **alia**, qui signifie *autre*. Comme cette racine se termine par la lettre *i*, on lui remarque une affinité particulière avec les corrélatifs.

Cet ajout est-il justifiable? Outre le fait que les corrélatifs sont fixés par le *Fundamento*, l'utilisation systématique de cette série amènerait nombre de confusions. C'est que, voyez-vous, la racine **ali-** existe déjà. **Alia** signifie *autre*; **alio**, *autre chose*; **alie**, *autrement*; **alii**, *être autre (chose)*. Ce

n'est donc pas comme si on créait un nouveau mot à partir de rien.

L'incorporation dans la langue des pseudo-corrélatifs comme **aliel** ou **alial** modifierait le sens des mots déjà existants. Pour *autre* ou pour *un(e) autre*, il faudrait dire **aliu**; **alia** voudrait dorénavant dire *d'une autre sorte*; et **alie**, qui veut actuellement dire *autrement* (qui se dirait alors **aliel**), signifierait plutôt *ailleurs*, que l'on traduit maintenant par **aliloke**.

On peut par ailleurs se demander si cet ajout, si problématique, est vraiment nécessaire. Si certains ressentent le besoin d'une telle série de corrélatifs, pourquoi ne ressent-on pas le besoin de la série opposée, qui serait construite à partir de **sam-**? Est-ce parce que l'adaptation serait beaucoup plus difficile, puisque la racine ne se termine pas par *i*?

On peut même se dire que, si Zamenhof avait choisi une autre racine

Si six scies scient six cyprès...

Peut-être vous êtes-vous déjà rendus compte du fait, que le mot *si* présente plusieurs sens. Outre la phrase connue qui coiffe cet article, on remarque chez les francophones une confusion qui se révèle en espéranto.

Comment traduiriez-vous en espéranto la phrase suivante: *Je me demande si tu vas venir*? On entendra souvent la réponse erronée: **Mi demandas min, se vi venos.**

Mais pourquoi cette phrase est-elle incorrecte? C'est que le mot espéranto **se** a comme fonction d'introduire une condition, comme dans: *S'il pleut, le pique-nique n'aura pas lieu: Se pluvos, la pikniko ne okazos.* (Incidemment, remarquez l'usage du futur pour les deux verbes.) Il est ici évident que, s'il fait beau, le pique-nique aura bel et bien lieu.

... La guerre ...

dans le présent, ou encore à une action qui est **habituelle**. Une **konstruata domo**, c'est une *maison en construction*. On ne peut évidemment habiter avec confort qu'une **konstruita domo**. Une **amantino**, c'est une femme qui est actuellement en amour. La **restoracio vizitata de mi**, c'est le *restaurant que je fréquente habituellement*.

Dans certains cas, on pourra difficilement employer le participe présent: que serait, selon vous, une **fondato asocio**? Une *association en train d'être fondée*? Mais quelle est la durée de la fondation d'une association? Le temps de signer un document? De même, qu'est-ce qu'une **vendata domo**? Une maison en vente n'est-elle pas encore **vendota**? À moins, bien sûr, qu'on ne veuille parler de cette maison qu'on ne fait qu'acheter et revendre, sans cesse...

Les participes présents ne peuvent donc se référer qu'à des actions qui présentent un minimum de durée.

On voit tout de suite que la première phrase ne fonctionne pas du tout sur le même principe: le questionnement (*je me demande*) ne dépend pas du tout de la venue de l'autre, au contraire du pique-nique qui dépendait du beau temps. On ne retrouve ici aucune condition.

En fait, cette première phrase est un cas de question indirecte. Elle est synonyme de la phrase suivante, construite sur le mode direct: *Je me demande: «Vas-tu venir?»* Or, en espéranto, la règle veut que les

questions directes et indirectes soient construites sur le même mode. À la question directe: **Mi demandas min: «Çu vi venos?»** correspond donc tout simplement la question indirecte: **Mi demandas min, çu vi venos.**

Au mot français *si* correspondent donc deux mots espéranto: on emploie le premier, **se**, quand il s'agit d'une condition; on emploie le second, **çu**, quand il s'agit d'une question. Une erreur à ce propos peut engendrer des malentendus. Toutes les langues ne fonctionnent pas comme le français.

Ne venko, sed kreskigo

Sylvan Zaft

Pourquoi ne pas remplacer la métaphore de la «victoire» par celle de la «croissance»? Ne conviendrait-elle pas mieux à une langue qui se veut pacifique?

Multaj esperantistoj emas paroli pri «la venko» de Esperanto. Tiu esprimo estas metafora. Neniu imagas ke la poruloj de Esperanto pafus la malamikojn. Tiu batalo estas sensanga.

Tamen eĉ sensangaj metaforoj bataloj povas yeki militsentojn ĉebruste. Tiaj emocioj povas plirapidigi la pulson; kaj timo kaj ĝojo povas kreski kaj malkreski en la koro.

La metaforo de «la venko» estas prenita el milito. Milito kutime estas vira multe pli ol ina. La koncepto alvokas konsekvencajn konceptojn. Kelkaj ebloj estas: 1) Je unu tago ni venkos la malamikojn (ekzemple, la poranglajn lingvobatalantojn). 2) Ni devas aŭ krei aŭ elekti kvazaŭmilitajn strategiojn por atingi la celon. 3) Ĝis la venkdato ni ne rajtas senti sin plene kontentaj.

Ni konsideru pli inan koncepton, «la kreskigadon» de Esperanto. Ĉi-okaze ni ne parolos pri la venko, ĉar malamikoj ne ekzistas. Ekzistas nur tero, grundo, kampo, pli aŭ malpli fekundaj, kie ni povas kultivi kaj semi.

Ni ne plu estos gebatalantoj, sed gegardenistoj. En la antaŭhistoriaj epokoj kutime la viroj estis ĉasistoj, kaj la virinoj estis kreskigantoj. Nun ni ĉiuj povos plenumi la rolon de ĝardenisto.

La konsekvencoj povas esti pli plaĉaj por multaj esperantistoj. Kiam mi helpas manplenor da novaj esperantistoj plibonigi sian regadon de la lingvo, mi ne devas kunporti la pezan emocian ŝarĝon de soldato en iu nova Centjara Milito, sed mi povas senti la kontentecon de iu kiu helpas florojn kreski.

Multaj, sendube, sentas sin komforte kun la kutima paroladmaniero pri «la venko». Tiu koncepto konformas al certaj psikologiaj bezonoj. Sed aliaj, geaj, sentos sin pli komforte kun la sugestita koncepto, kaj nun povos elekti plene konscie la koncepton kiu konformas al iliaj propraj psikologiaj bezonoj. Por la lastaj la nova koncepto povos alporti sentojn pli pacajn, kiuj eble pli taŭgas por pledantoj por lingvo de paco kaj amikeco. [El *esperanto*, decembro 1993]

Fakaj organizoj vastigas la terenon de Esperantouzado

Skolta agado en Esperanto — profunde internacia skoltado

Anna Magareta Ritamäki

En oktobro 1993 pasis 75 jaroj de kiam Alexander William Thompson skribis libreton *Propono pri Skolta Esperantista Ligo*. Tio estis la komenca pašo por la kunligo de du grandaj idealaroj, la skolta kaj la Esperanta. Tio naskis la *Skoltan Esperantistan Ligon*, ekde 1972 nomatan *Skolta Esperanto-Ligo*. La unuaj jaroj estis sukcesaj kun internaciaj SEL-tendaroj, kaj pinte en 1933 partopreno en la *Monda skolta jamboreo* en Hungario kun granda grupo de Esperantoparolantaj skoltoj. Sed la kondiĉoj ne estis favoraj por SEL. La monda skolta organiza praktike malpermesis la uzadon de Esperanto en 1934. «Car Esperanto ne havas praktikan valoron», la organiza decidis «ne rekomendi» la lingvon al siaj membroorganizo. Tiun rezolucion oni nuligis en 1964 kaj nuntempe la sinteno de la monda skolta oficejo certe ne estas malaproba, sed la kontaktoj estas malmultaj, ĉefe pro la malfarto de Skolta Esperanto-Ligo.

Dum kelkaj jaroj estis granda krizo en SEL. Gravaj funkciuloj kiuj delonge laboris devis eksigi. Estis probelmoj trovi novajn fortotojn. Tiu krizo estis jam

plejparte venkita kiam mi komencis redakti la organon de la Ligo *La Skolta Mondo* fine de 1992, eĉ se daŭre ni serĉas novan ĝeneralan sekretarion kaj pliajn novajn aktivulojn.

Aktiva agado

Okazas internaciaj SEL-tendaroj. Jam okazis plurnaciaj SEL-tendaroj SKOLTO 91, 92 kaj 93. Okazis ankaŭ aliaj SEL-aranĝoj en diversaj landoj. Kaj ŝajnas ke la evoluo ne stagnas. Ekzistas planoj ankaŭ por 1994. Kiel redaktoro estas ĝojige ricevi raportojn pri lokaj SEL-grupoj el la tuta mondo. Okazas kursoj laŭ la skolta lernolibro *Jamborea Lingvo*, kiu baldaŭ aperos en renovigita eldono. SEL planas aktive partopreni la grandajn skoltaj tendarojn en Nederlando en 1994 kaj 1995, la Eŭropa kaj Monda Jamboreoj.

Internacia dimensio al la agado

Por mi, antaŭe tre aktiva skoltino, poste tre aktiva esperantistino, la SEL-tendaroj estis mirindaj travivajoj. Esperanton ni ne uzis nur ĝenerale por uzi Esperanton, por umi kune

Esperante, sed pro nia komuna intereso, pro skolteco kaj niaj aktivecoj estis tradicie skoltaj. Esperanto estis por ni bongustiga spico, kiu donis profundan internacian etoson. Certe ne nur SEL, sed ankaŭ multaj aliaj fakaj organizoj povas atingi la samon. Esperanto atingas homojn kiuj ne interesigas nur pri la ĝenerala Esperantomovado ĉar Esperanto donas plian, internacian dimension al la jam kutima agado.

Speciala Jubilea Numero

La Jubilean Numeron de *La Skolta Mondo* vi povas ricevi kontraŭ du internaciaj respondkuponoj, mondonaco (uea-konto: selx-m), aŭ eĉ senpage skribante al la redaktorino: A. M. Ritamäki, Peltolavägen 6 B 36, 20720 Åbo/Turku, Finnlando. En ĝi aperas informoj pri la historio de SEL, sed ankaŭ pri la nuna agado. Membroj de SEL ricevas la gazeton kvarfoje jare. Mi volonte donos pliajn informojn ankaŭ pri SEL kaj pri la eblecoj membrigigi.

Leceburga rokmuziko

Se rokmuziko plej ofte estas sinonimo de usona lingva imperiismo, ekzistas tamen en tiu sfero tre bona iniciato meritantan apogon. En orienta Francio, asocio kaj rokkantistoj uzas, por esprimi sin, la regionan lingvon: la leceburan. Tiu regiona asocio kaj la rokgrupo *Tutti Fitti* (t.e. *Tute Fuſita*) agadas por konatigi kaj uzatigi sian minoritatan lingvon per rokmuziko. Jam estas eldonitaj du laser-diskoj, el kiuj unu tute en la leceburga sur la titolo *Musek ouni grenzen* (t.e. *Muziko sen limoj*). [El *Etnismo*, 1994.01.15]

Langue parfaite

Bien des idées reçues sur l'espéranto sont remises en question apr un livre du professeur Umberto Eco (auteur du *Pendule de Foucault*) paru en Italie: *La ricerca della lingua perfetta* (*La recherche de la langue parfaite*). Un grand écho du livre d'Eco est donc à prévoir dans toute l'Europe... D'autant plus qu'il va paraître dans au moins quatre autres langues dans la collection *Construire l'Europe*: en allemand, anglais, français et espagnol. La conclusion et l'attitude positives à l'égard de l'espéranto de cet homme de renommée mondiale, un des plus éminents spécialistes de sémiotique, font déjà évoluer les choses.